


La Krokodil'



Informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo
1 rue Jean Aillet, 31000 Toulouse
tel/fax 05 61 25 55 77 courriel : esperanto.toulouse@free.fr
<http://esperanto.toulouse.free.fr/>

N° 34 - septembro 2005

Bonjour,

Notre association a fait sa rentrée, vous avez reçu la circulaire, avec liste des cours et des activités proposées ou prévues.

La rentrée, c'est le 1^{er} Cours-Express qui a réuni sept élèves le mardi 13 septembre.

La rentrée, c'est Catherine, notre nouvelle animatrice culturelle, qui a commencé son travail de diffusion de l'espéranto dans les établissements scolaires.

C'est vous qui êtes venus au premier repas-tchatche, le 9 septembre (11 présents).

La rentrée, ce sont aussi tous les projets que nous avons, les vôtres, les nôtres : accueillir une Chinoise qui nous parlera de son pays, accueillir des groupes pour leur faire visiter notre région, voyager ensemble à une ou des rencontres internationales, rendre plus accessibles les livres de la bibliothèque, améliorer le site internet, relancer l'activité théâtre....

Nous vous invitons à venir en parler à notre prochaine réunion du CA, le **jeudi 13 octobre**, puis à notre Assemblée Générale, le **jeudi 17 novembre**. Toutes les bonnes volontés sont utiles et précieuses.

Jeannette

Kalendaro / Calendrier

Septembro

Ve 23 Pique-nique Jeunes
Sa. 24 Portes Ouvertes à Rangueil
Sa.-Di. 24-25 Week-end montagne Cheminots
Je. 29 Débat au *Bâton à Palabre* (temo :viaj ferioj)
Ve. 30 Début Cours à St Orens

Oktoebro

1-8 inter. Renkontiĝo de Kulturo & Turismo (Calella, Hispanio)
Ven 07 *Mangô-klaĉo* à Rangueil
Sam 08 Journée des assos, Place du Capitole
Jeu 13 Début 'Paroliga kurso' à Rangueil
Jeu 13 Réunion C.A.
Ven 14 Présentation de l'esp. à St Gaudens
Sa.-Di. 15-16 Week-end à Arrout (cours 2 niveaux)
17-21 Stand à l'université Paul Sabatier
Jeu 20 Assemblée Générale EKC ????
22 au 29 Stage choral à Montferrier (Ariège)

Novembro

Ven 4 *Mangô-klaĉo* Rangueil
Mar 8 Début d'un Cours Express
Jeu 17 Assemblée générale EKC (?)

Décembro

Ven 02 réunion et *Mangho-klacho*
Sam 10 Fête de Zamenhof (???)

Enhavo :

OKAZOS / *Ne ratez pas* 2
Fête des assos pl du Capitole 2
Pique-nique Jeunes 2
S-ino Jiang, ĉinino en Tuluzo 2
L'espéranto à St Gaudens 2
Week-end à Arrout 2
La bibliothèque réouverte 3
Les livres de la rentrée 3

Komune festi la novan jaron 4
OKAZIS / *Nous avons fait :*
Hungaroj en Belcastel (81) 5
Kroataj infanoj en F.I.T.E. 5
Spertoj pri esperant-
renkontiĝa somero 5
Week-end catalan 5

Eo en la mondo :
Monda Asembleo Socia 6
Instrui en Ĉinio 6
ITV 6

OKAZOS / Ne ratez pas

Fête des associations, sam. 8 octobre, place du Capitole

Les jeunes espérantistes tiendront un stand ; n'hésitez pas à passer les voir, à inciter vos amis à rencontrer l'espéranto, et pourquoi pas à leur donner un coup de main ?

Pique-nique jeunes / junulara manĝo-klaĉo

Le vendredi 23 sept. aura lieu le premier pique-nique espérantophone jeunes de Toulouse ! Je ne vous dis pas où il aura lieu, car le rendez-vous a déjà changé deux fois..., mais les concernés seront toujours bien informés (téléphone arabe, signaux de fumée ou... internet !

S-ino JIANG, ĉinino en Tuluzo

S-ino JIANG Xiaofeng naskiĝis kaj vivas en Ŝanhajo (Shanghai). Ŝia edzo estas emerito, sed ŝi ankoraŭ laboras kiel sekretariino. En aŭgusto 2004 ili tre afable gastigis Jeanne-Marie Cash kelkajn tagojn en sia novkonstruita komforta apartamento, en alta loĝturo de tiu giganta urbo, Ŝanhajo. Ĉi jare mi invitis ŝin al nia urbo, por viziti nian regionon kaj landon.

Kiam ŝia alvenodato estos konata, ni invitos ŝin pasigi agrablan vesperon kun esperantistoj de Tuluzo, por ke ŝi prezentu sian landon kaj respondu demandojn de scivoluloj.

Daŭriga Kurso kun Rikardo : 13-an de oktobro

La Daŭriga Kurso (*Cours de Continuation*) komenciĝos jaŭde la 13-an de oktobro. Ĝi okazos en la Rangolia Kvartaldomo (Maison de Quartier Rangueil, 19 rue Claude Forbin, 31400 Tuluzo), de la 20.30 ĝis la 22.00. Gvidas ĝin Rikardo.

La kurso celas ĉefe la finintojn de la Rapid-Kursoj (*Cours-Express*), sed ankaŭ ĉiujn kiuj

jam iom lernis esperanton kaj volas ekzerciĝi. Ĉiu leciono estas unuaĵo bazita sur teksteto aŭ ludo. Ĝi kostas po 20 € por trimonato.

Notu ke la Diskut-Vesperoj en kafejo Bâton à Palabres okazas jaŭde (kutime la lastan jaŭdon de ĉiu monato), kaj mia kurso ne okazas tiam.

L'Espéranto à la Biocoop de St.-Gaudens

A la demande de l'association Carline, qui gère la Biocoop de St.-Gaudens, Bernard Martinez ira le vendredi 14 octobre en soirée présenter l'espéranto et les activités du Centre Culturel Espéranto, avec le support du film Montpellier 1998.

Week-end studieux à Arrout : débutants et avancés

15/16 octobre, retenez cette date si vous désirez découvrir la langue internationale espéranto, vous perfectionner, ou simplement la pratiquer, dans un cadre de belles montagnes, et une ambiance chaleureuse. Le gîte de la Sunkompanio nous accueillera comme d'habitude, en chambres à 3 ou 6 lits, avec petit-déjeuner, le dîner du samedi et le

déjeuner du dimanche. Il faut apporter un pique-nique pour le samedi midi.

Horaire des cours : 10 h. de cours, à répartir en fonction du soleil ou de la pluie, entre le samedi 10 h. et le dimanche 17 h.

Participation aux frais :

Adhérents d'Espéranto Kultur Centro :	30 €
Non adhérents (inclut l'adhésion) :	48 €
Etud/Chômeurs non adhérents :	39 €

La biblioteko et la permanenco re-ouvertes

Les lundis de 16 h à 19 h (sauf vacances scolaires), dans la salle des associations de la Maison de Quartier Ranguel (entrée par-derrière), aura lieu la permanence, avec la présence, en alternance, de Catherine, Christophe, Rikardo. Rien de tel pour s'informer, emprunter un livre ou un magazine, ou écouter de la musique en espéranto.

Les livres de la rentrée

Notre librairie s'est enrichie... quelques suggestions de livres à lire, entendre, et acheter.

Gerda malaperis... la ko-disko aperis !

Ĉu necesas prezenti la romaneton de la fama Claude PIRON, kiu en 25 ĉapitroj, kondukas komencantojn iom post iom lerni la gramatikon kaj bazan vortaron de esperanto?

Multaj lernis la internacian lingvon per tiu ĉi metodo. – 4,20 €.

Nun *Gerda* aperis kiel ko-disko, ĉe Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo.

Per la voĉoj de : [Lucas Yassumura](#), [Emilio Cid](#), [Simone Schumacher-Cid](#), [Leandro Aristeu](#), [Ana Mikami](#), [Petola](#), kun permeso de la aŭtoro Claude Piron. – 5 €.




La Krimo de Katrina

estas alia romaneto por komencantoj. Ĝi ne estas kurso, sed interesa romano, por tiuj, kiuj lernis la bazan esperanto-gramatikon kaj la plej bazan vortaron.

La krimo de Katrina, Sten Johansson, Al-fab-et-o, Skövde, Svedio, 2001, – 4,45 €.

Tinĉjo en Tibeto

Tiu albumo emfazas la toleremon, la amikecon, kaj la solidarecon inter diversnaciaj homoj. Esperanto ĝuste



kontribuas al la disvolviĝo de tiuj valoroj tra la mondo. En bela traduko de Hervé Gonin. – 11,50 €

Tradukita de junula grupo, tiu unua *Gastono*-bildostrio estas eldonita de esperanto-Jeunes (JEFO) en 2005.

Gastono Lafuŝo estis kreita en 1957 por vigligi la paĝojn de la humura gazeto *Spriou*. En 19 albumoj, tiu revemulo senĉese inventas solvojn por plibonigi la oficejan vivon, enamiĝas, prizorgas katon kaj ridmevon, sed ĉio tio okazigas nur fuŝajn, kiuj ĉagrenas liajn estrojn. – 8 €.



Gastono

Tiel diru! (5 000 expressions espéranto). Compilation Lentaigne. Eld. SAT-Broŝurservo, CEA, Beauville, 1984 (neindikita). 127 p. Glu-bindita kun kartona kovrilo. - 5 €.

Ĉi tiu esprimaro havas 5 000 esprimojn alfabete ordigitajn laŭ 1 000 francaj vortoj. Ekzemple, si vi volas scii kiel traduki *Quand on parle du loup...*, serĉu sub **Loup** por trovi la esperantan version, "Pri la lupo rakonto kaj kun lupo renkonte". Multaj esprimoj venas de la *Proverbaro* de Zamenhof. Ĝia pedagogia valoro estas evidenta, ĉu por traduki unuopan esprimon, ĉu por ĝuiga trafolio.

*Ce lexique contient 5 000 expressions en ordre alphabétique autour de 1 000 mots en français. Par exemple, si vous cherchez à traduire « Quand on parle du loup... », regardez sous **Loup** pour trouver la version en espéranto, « Pri la lupo rakonto kaj kun lupo renkonte ». Beaucoup de ces expressions viennent du Proverbaro de Zamenhof. Sa valeur pédagogique est évidente, que ce soit pour traduire une expression donnée, ou pour le feuilleter avec plaisir.*

Saturno. Poemas bilingües / dulingvaj poemoj. Jorge Camacho. Eld. Bero, Rotterdam 2004. 138 p. Glu-bindita kun kartona kovrilo. - 11,45 €.

Jen cento da modernaj poemoj, plejmulte mallongaj, en la hispana kaj en esperanto. La poemoj de Camacho estas sufiĉe intelektaj, do ne aparte kortuŝas. Sed ili jes ofte surprizas, ekzemple kiam li komparas sunrebrilon sur la haŭto de sia amatino je Jupitero kaj la Lakta Vojo. Preferataj temoj estas socio kaj teknologio, amo kaj amoro.

Voici une centaine de poèmes, majoritairement courts, en espagnol et en espéranto. Les poèmes de Camacho sont assez cérébraux, donc ne sont pas spécialement émouvants. Mais ils sont souvent surprenants, par exemple lorsqu'il compare la réflexion de la lumière du soleil sur la peau de sa bien-aimée avec Jupiter et la Voie Lactée. Les sujets préférés sont la société et la technologie, l'amour et le sexe.

'Komune festi la Novan Jaron'

La kvara Novjara Renkontiĝo

okazos en la germana urbo Frankfurt/Main, de la 28-a de decembro 2005 ĝis la 8-a de januaro 2006. Estos ampleksa programo kun teatraj kaj muzikaj prezentoj, kursoj, prelegoj, kaj ekskursoj. Okazos granda Mezepoka Festo kaj – kompreneble – ni plenanime festos la silvestran nokton. En la pasintjara NR partoprenis 153 homoj – familioj kun infanoj, unuopuloj, pliaĝuloj; ĉeestis naŭdek eksterlandanoj el deko da landoj. Legu plu ĉe <http://www.esperantoland.org/nr>.

22-a IF : tradicia jarfina aranĝo en Trier.

Ĝuu la internaciecon de nia aranĝo kaj konatiĝu pli detale kun la plej malnova urbo en Germanio.

Nia aranĝo estas seminario por lingve spertaj personoj, baza kono de Esperanto, kaj ĝia uzo estas gravaj. Laŭdezire okazas paroligaj kaj porkomencantaj kursoj, ekz-e por via partner(in)o. La infanoj ĝuas paralelan porinfanan programon sub gvido de kunlaborantoj.

Jam 20 infanoj estas aligxintaj!

Pliaj detaloj : www.internacia-festivalo.de.

Internacia Seminario (por junularo) 27.12.2006-03.01.2006 en Xanten

Temo: Religioj, kulturoj kaj vivfilosofioj en la 21a jarcento

<http://www.esperanto.de/is/eo/2005/index>

Ĉu estus bona ideo, organizi komunan vojaĝon, en internacia etoso, eble kun kelkaj hispanoj? Bonvolu sciigi vian opinion pri tio.



OKAZIS / NOUS AVONS FAIT

Hungaroj en Belcastel (81)

Merkrede 27-an de junio, en Belcastel, ni akceptis la 19 hungarojn lundon vesperon kun multa ĝojo. La vespero estis tre agrabla kaj la francaj esperantistoj, post kelkaj horoj kaj kelkaj glasoj da vino (por Francis la plej multe) parolis esperanton ne tre bone sed sufiĉe por esti kompreneblaj kaj por kompreni la aliajn. La lernantoj de Daniel ne kredis ke oni povus paroli pri ĉio kun hungaroj tiel facile. La hungaroj estis tre «simpatiaj» kaj ili kantis, parolis kun ĉiuj pri sia vivo, sia lando, pri la ekonomio, Eŭropo, k.t.p. — Annie

Teatro : Kroataj infanoj en FITE /

Croates au Festival International de Théâtre d'Enfants (FITE)

Le 21 juin, le groupe de théâtre *Fajreroj* de l'école primaire Mladost de Zagreb, a présenté une création *Sonorilo serĉas feliĉon*, au théâtre Daniel Sorano à Toulouse. Peu d'espérantistes malheureusement ont pu les applaudir, en raison de l'heure du spectacle. Cette troupe et son accompagnatrice Mme Marija Jerković avait été invitée par notre association, mais a été hébergée par les enfants de LACAUGNE, commune assez loin de Toulouse.

Week-end catalan de Barcelone - 17-18 septembre

Deux Toulousaines, Kiki et Sylvie, ont fait le voyage. Qu'ont-elles vu, entendu, fait ? Elles nous le diront, je l'espère, dans le prochain *Krokodil*.

Spertoj pri esperant-renkontiĝa somero

Mi estas ege bonŝanculino ĉar ĉi-somere mi partoprenis en kvar eo-renkontiĝoj. Tio dank' al mia partopreno en TTT. Mi devis teatroludi dum KEF en Helsinko, UK en Vilno, kaj FESTO en Francio. Pro tio mi ne povis serĉi laboron ĉi-somere. Sed ne gravis! Mi profitis tiun okazon por eo-vojaĝi. Do mi ne limigis mian vojaĝon tiel. Mi daŭrigis ĝin ĝis Zakopane kaj Vác: respektive IJK kaj IJS.

Malbonŝance mi ne sukcesis partopreni dum la tuta KEFa renkontiĝo, sed mi tre ĝojis pro la etoso, ĉefe vespere kiam ni kune iris ĝis la malproksima kafejo kiu ĝuste nomiĝis «Liberté» kaj kiu gastigis la plej bonan esperantan muzikon kiel Esperanto-Desperado, Dolĉamar, kaj aliajn....

UK estas certe tre bona renkontiĝo por maljunaj homoj kaj tre ĝojigas min scii ke ili amuziĝas dum tia okazo. Mi-mem ne havas apartajn aĵojn por diri pri tio. La etoso estis tro trankvila, sed neantaŭplanitaj koncertoj ĝojigis tiun etoson.

La IJK estis la plej bona renkontiĝo, laŭ mi. Estis preskaŭ 500 homoj, kaj mi amikiĝis kun rusoj, katalunoj, israelanoj, kaj palestinanoj (jes, jes, veras!), kun kiuj mi ĝuis la diverskonsistan programon de IJK. Inter aliaj aĵoj, miaj tagoj estis plenaj de ekskursoj en Tatra monto (la pejzaĝo estis nevertpentrebla), en Krakovo, en salminejo de urbeto Wieliczka, kursoj por instrui e-on, prelegoj pri frenezaj aŭ seriozaj temoj, ludoj kelkfoje sportaj (ekzemple korbopilko), aŭ kartrolaj ludoj kiel «Homlupo» (ege amuza!). Ĉu mi rajtus skribi pri vesperoj? Do se jes, mi dece skribus ke ni multe trinkis, dancis, bambumis, kelkaj flirtis..., kaj pli se kuniĝemo....

La IJS estis pli sobra eble ĉar estis malmultaj homoj (ĉirkaŭ 100), aŭ ĉar la partoprenantoj jam partoprenis en IJK kaj konsekvence estis lacaj, aŭ pro la malbona vetero kiu bonŝance ne ĉiamis... mi ne scias. Finfine ĝi estis tamen sufiĉe simpatia. Ni kanuis, ni ludis preterurbvagante, ni denove

homlupis, kelkaj partoprenis en legendaj ludoj por novuloj, ni ekskursis en Budapeŝto (ĉarmega urbo), ni vingustumadis en ŝipo, kaj aŭskultis gitaran koncerton ĉirkaŭ fajro. Estis vera kunproksimiga renkontiĝo.

Sed ankoraŭ pli kunproksimiga estis FESTO! Ni estis ĉirkaŭ 25 homoj. Do imagu la proksimecon! Estis varmetosa renkontiĝo. Iomete freneza ankaŭ. Nia teatra trupo lastfoje ludis. Ankaŭ eblis profiti komikan teatran talenton de Benoît, Christophe, Armelle, kaj David dum falsa geedziĝo ĉeeste de... la Papo! Sed mi ĉesu nun malkovri al vi surprizajn eventojn de esperantaj renkontiĝoj, esperante ke vi-mem iam spertos ilin.

— Catherine

Esperanto en la mondo

monda asembleo socia - Asocio fondita laŭ unika maniero

La 2-an de aŭgusto, post kvinmonata reta diskutado, interkonsentiĝo, kaj fina aprobo de sia fundamento (statuto, oftaj demandoj, kaj regularo pri aliĝoj), MAS, la MONDA ASEMBLEO SOCIA, oficiale fondiĝis. Jen cetere sufiĉe unika maniero fondi asocion – kaj ankaŭ sufiĉe interesa, ĉar ĝi ebligis senurĝe kaj ĝisfunde pridiskuti la fundamenton de la asocio kaj interkonsentiĝi pri ĝi – ĝi estis fakte la unua paŝo de nova vojo de memorganiziĝo de asocio, kies ecoj estas same novaj.

Kio estas MAS?

La tutmonda organizo de ĉiuj homoj kiuj ne nur konvinkiĝis ke pli bona mondo eblas, sed kiuj pretas kune diskuti kaj agi

por realigi ĝin. Ili agas por la monda paco, defendas la interesojn de la tuta homaro kaj klopodas por evoluigi – komencante ĉe si mem – eksternacian pens- kaj ag-manieron home solidaran. Ili strebas kontribui al starigo de mondwide senklasa socio sen ekspluatado, socio kiu respektas la dignon de siaj membroj sen distingo de aĝo, haŭtkoloro, sekso, seksa orientiĝo, etna aŭ nacia aparteno kaj kredo – socio kiu organizas sian ekonomion laŭ la bezonoj de ĉiuj siaj membroj, protektante la planedon Tero por estontaj generacioj.

⁵

Pli da informoj : <http://mas-eo.org>.

Vilhelmo Lutermano

Instrui en Ĉinio

Meze de julio, jena informero aperis en NUN:

Ĉina universitato bezonas fremdlingvajn instruistojn

Pekina Universitato de Fremdaj Aferoj kaj Ekonomio de Ĉinio deziras inviti kelkajn instruistojn de la angla, la hispana, la franca, kaj aliaj lingvoj, sed ili devas esti esperantistoj. Kaj alia lernejo en Nordorienta Ĉinio ankaŭ bezonas anglajn instruistojn, kies gepatra lingvo devas esti la angla lingvo.

Se tio interesas vin aŭ viajn amikojn, do kontaktu min : cuijiayou@yahoo.com.cn.

ITV komencis testi la elsendon la 1-an de aŭgusto 2005



Internacia Televido,
la esperantista TV

Programtabelo kaj vinjetoj de Internacia Televido jam pretas

Sendita de Redakcio je 2005/8/30 14:00:23 (535 fojojn)

Ĉiuj programoj de Internacia Televido, la unua interreta televidkanalo tute en esperanto, jam havas siajn vinjetojn (enkondukajn videojn, kiuj antaŭas aŭ postsekvas televidprogramojn). Ankaŭ la programtabelo de la televidkanalo esperantista estas nun disponebla al la publiko.

Nun la administracio de la televidkanalo eniras la fazon de **postmuntado de la programoj**, kiuj estos elsenditaj kiam Internacia Televido estos lanĉita. La oficiala lanĉo de la televidkanalo esperantista, kiu devus okazi en la fino de aŭgusto, estis prokrastita provizore al la 15-a de oktobro, tial ke multaj el la videoj, filmoj, kaj vidbendoj kun programoj, kiujn atendas la administracio, ankoraŭ ne atingis Brazilon pro la ferioj, kiujn ĝuas multaj eŭropanoj kaj usonanoj, en la norda hemisfero.

La vinjetoj de Internacia Televido jam signas la profesiecon, kiun rigore postsekvas la teknika teamo de la televidkanalo. Ĉiuj vinjetoj estis originale faritaj por Internacia Televido. Kelkaj el ili, kiel ekzemple *Infanurbo*, postulis tri semajnojn por esti finpretigita, pro tio ke temas pri originale farita 3-D kartuno (moviĝanta desegno). La alta kvalito de la vinjetoj kaj de la postmuntado certe impresos tiujn, kiuj ankoraŭ kredas neebla bonkvalitan televidkanalon en esperanto. Abonantoj de Ĝangalo povas ekskluzive antaŭĝui la vinjetojn de Internacia Televido, en la kanalo *Aŭdvide*.

Dusemajna Programtabelo de Internacia Televido

DIMANĈO	LUNDO	MARDO	MERKREDO	ĴAŬDO	ĴENDREDO	SABATO
Jen nia Mondo	E-Kurso	E-Dosiero	E-Kurso	Ĉioscio	Muzikume	E-Dosiero
Teleĵurnalo	Muzikume	E-Kurso	Jen nia Mondo	E-Kurso	Amuzaj Videoj	Kinofilmo
Infanurbo	Ĉioscio	Amuzaj Videoj	Teleĵurnalo	Vid-al-Vide	E-Dosiero	Kinofilmo

DIMANĈO	LUNDO	MARDO	MERKREDO	ĴAŬDO	ĴENDREDO	SABATO
Jen nia Mondo	E-Kurso	E-Dosiero	E-Kurso	Ĉioscio	Muzikume	E-Dosiero
Teleĵurnalo	Muzikume	E-Kurso	Jen nia Mondo	E-Kurso	Amuzaj Videoj	Sur la Scenejo
Vid-al-Vide	Ĉioscio	Amuzaj Videoj	Teleĵurnalo	Infanurbo	E-Dosiero	Sur la Scenejo

Alia nekontestebla pruvo pri la seriozeco de la administracio montriĝas en la programtabelo, kiu estas nun diskonigita al la esperantista publiko. Ĉiutage estos novaj programoj, kiuj varias laŭ la horo, je kiu oni aliras la retejon por spekti la esperantistan televidkanalon. La programoj (po tri por tago, t.e. unu horo kaj duono entute) ripetiĝos kelkajn fojojn tage, tiel ke eblas spekti la programojn en diversaj horoj.

Ĉe la lanĉo de Projekto ITV, la ideo estis krei kvar horojn da originalaj programoj ĉiutage, sed tial ke la kampanjo ne sukcesis atingi la bezonatan sumon (35 mil eŭroj), la administracio preferis daŭre liveri novajn programojn, dum malpli longa tempo. La alveno de novaj monkontribuoj ebligas al Internacia Televido krei pli da programoj originalaj tage.

Por monkontribui, bv. iri al <http://internacia.tv/modules/xdonations/>.

La plej facila maniero mone kontribui al Internacia Televido estas per kreditkarto. La administracio uzas la servojn de la tutsekura transpaga sistemo PayPal por ricevi la monkontribuojn de la subtenantoj de la projekto.

Se vi ne havas kreditkarton, vi povas ĝiri monon al la UEA-konto de Ĝangalo, kiu estas GXAN-V. (*Ankaŭ eblas doni monon al UFE, aŭ al EKC, kiuj transdonos ĝin*). Informu admin@interancia.tv.

Aktiva partopreno de la esperantistoj, kiuj povas sin proponi kiel **tradukistoj**, **dublistoj** kaj **reprezentantoj**, same kiel la subteno de la televidkanalo pere de pliaj monkontribuoj, estas treege gravaj nun, kiam staras la e-movado ĉe la sojlo de historia momento – la lanĉo de propra televidkanalo.